PILO-PRESS
Internacia
Informservo

Pilo-Press
Jara abono
30,--GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 3/78 - 20 jan 1978
Aperas ĉiusemajne

## Ralph Harry - honora gasto ĉe Aŭstralia Esperanto-Kongreso

Launceston (pp) - De la 2-a ĝis la 8-a de januaro 1978 okazis la 21-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, kiu samtempe estis la unua Esperanto-kongreso en 1978, en Launceston, la dua plej granda urbo de Tasmanio, insulo sude de Melburno.

Honorgasto ĉe la kongreso estis s-ro Ralph Harry, la aŭstralia ambasadoro ĉe la U.N.O. en Nov-Jorko. Li prelegis pri la temo "Esperanto kaj Diplomatio", kiu fakte estis la historio de s-ro Ralph Harry en Esperantujo, en kiu li multe laŭdis la agadmanieron de la germana Esperanto-movado.

Dum la kongreso, prof. R. Robertson, prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, transdonis al s-ro Ralph Harry la honorinsignon de A.E.A. por elstaraj servoj al la aŭstralia Esperanto-movado. Tiu insigno estis aljuĝita al Ralph Harry en 1976, sed nur nun transdonita al li, ĉar li siatempe estis en Nov-Jorko.

Ĉar s-ro Harry naskiĝis en Launceston kaj tie vizitis Kolegion, lia ĉeesto estis raportita en la loka taggazeto "The Examiner". Ankaŭ la urbestro honoris la "faman filon" de Launceston kaj akceptis s-ron Harry ĉe oficiala akcepto en la urbodomo. Raportistoj ne mankis kaj la venontan matenon aperis denove longa artikolo pri s-ro Harry kaj Esperanto, kun bildo de s-ro Harry en "The Examiner". Aliaj gazetoj en Tasmaniaj urboj transprenis la novaĵon kaj raportis. La loka Televida Stacio intervjuis s-ron Harry, kune kun prof. R. Robertson, la prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Herbert Koppel

## Testamento de Raoul Follerau en Esperanto

Luksemburgo (pp) - Por la 25-a mondotago de la lepruloj, la 29-an de januaro 1978, la Esperanto-Centro Luksemburgo eldonas kune kun la "Fondation Follerau A.S.B.L." la testamenton de Raoul Follerau (Raul Folero) al la junularo de la mondo en Esperanto-traduko.

Oni povas senpage mendi tiun gravan kaj interesan dokumenton ĉe

Esperanto-Centro Luksemburgo, 1 A, rue des Bains, Poŝtfako 628 Luksemburgo.

Bonvolu ĝiri antaŭe la sendokostojn al la poŝtĉekkonto 5088-44 de la Esperanto-Centro aŭ sendu sufiĉe da respondkuponoj.

137 landoj organizas tiun mondotagon. 14 - 16 milionoj da homoj en la tria mondo suferas pro lepro. Ni ofertu al tiuj malfeliĉaj homoj nian partnerecon. Bonvolu disdoni la broŝurojn inter la esperantistaro! Helpu nin helpi!

"Neniu rajtas esti feliĉa tutsola", diris Raul Folero.

## Slovaka antogio en Esperanto

Aperis nun Slovaka Antologio en Esperanto. Ĝi estas baldaŭ liverebla post ricevo de la stoko. Prezo de la libro 23,80 GM. Mendu jam nun ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Pĉk. Nürnberg 819 56-851.

Ne forgesu mendi la novan libron "Trigroŝa Romano" de Bert Brecht, prezo 32,-- GM, same ĉe Ludwig Pickel!

## 60 personoj ĉe la inaŭguro

München (pp) - Sabate, la 21-an de januaro 1978 kolektiĝis ĉ. 60 esperantistoj el diversaj bavaraj urboj, por inaŭguri la 1-an Esperanto-Gastejon en Bavario (Adreso: Germana Angulo, Deutsches Eck, Schwanthalerstr. 58, D-8000 München).
La eksteran ŝildon malkovris Karl-Ernst Paech, München. Por la Bavara Esperanto-Ligo parolis Stefanie Tucker, por la Klubo Munkeno Josef Weidacher kaj por la Germana Esperanto-Instituto Gerald Tucker.

Por ke la plano kaj projekto pri Esperanto-Gastejo en München realiĝis, pri tio speciale meritas Johann A. Pachter. Bonan paroladon pri la historio de Esperanto faris la juna esperantisto Reinhard Fössmeier.

La ceremonion ĉeestis la Televido (ZDF) kaj kelkaj ĵurnalistoj. ORF-Radio Vieno raportis pri la Esperanto-gastejo en siaj kurtondaj elsendoj.

Entute oni povas paroli pri sukcesa aranĝo, en kiu regis agrabla kaj bona etoso.

Esperebl multaj esperantistoj, kiuj restadas en Munkeno, vizitos la novan Esperanto-gastejon!

## Reagoj

Eble interesas vin aŭdi ke ni regule uzas parton de viaj novaĵoj, sed nur tiujn, kiuj estas de ĝenerala intereso je la alia flanko de la terglobo.

Herbert Koppel, Redaktoro de
The Australian Esperantist

Plej unue koran gratulon al via Pilo-Press, n-roj 1 kaj 2 en la nova jaro! Pola Radio detale raportis pri la mesaĝo novjara de nia prezidanto, s-ro Tonkin, laŭ via Pilo-Press! Ĉion bonege mi kaptis! Vi faris tre ĝuste, aperiginte ĝin en plena formo!

Dr. J. Kondor, Neuwied

## Pri Luksemburga Esperanto-Centro

### Raporto de d-ro J. Kondor (daŭrigo)

La plej granda Luksemburga taggazeto - Luxemburger Wort - regule aperigas informojn pri Esperanto. Ekz. sub la rubriko "Specialaj Diservoj" aperas ĉiusemajne, ke en Fetschenhof-Cents okazas ĉiudimanĉe, je la 10,30 h, Sankta Meso en Esperanto kaj latina lingvo, en aranĝo de la Esperanto-Centro Luksemburgo. Kun fiero parolis Triksini pri sia Esperanto-pavilono, kiun li ricevis senpage de la urbo por instrui tie Esperanton al la junularo kaj plenkreskuloj. Tiu ĉi vere bela, moderna konstruaĵo staras en Fetschenhof, apud la kapelo kie la Diservoj ĉiam okazas.

Mi havas la feliĉon ambaŭ konstruaĵojn rigardi per propraj okuloj, kaj mi devas konstati, ke ili estas vere grandiozaj, elegantaj, unikaj en la historio de Esperanto. La pavilono konsistas el du grandaj klasĉambroj, kiuj estas konstante vigle vizitataj, uzataj! Triksini mem gvidas du kursojn en la pavilono, sed ankaŭ aliaj lingvoinstruistoj helpas al li.

En la "Pul-merkato" li faras grandan porpagandon por Esperanto, disdonante tie diversajn propagandilojn, lernolibrojn ktp. al interesuloj. Antaŭ Kristnasko ĝi funkciis dum unu semajno, alie en difinita tempo. Foje ankaŭ la Granddukino kun la filo vizitis lian informstandon tie ĉi kaj ricevis informojn pri Esperanto.

Daŭrigo sekvos!

La semajna komentario de Radio Vieno

ORF-Kurtondo-Esperanto prezentis jenan semajnan komentarion de d-ro Alfred Macher, prezentitan de d-ro Karl Beckmann kaj Emil Vokal:

"En la tradicia, pordiplomata novjar-aŭdienco ĉe nia Federacia Prezidento, la Vatikana ambasadoro laŭdis la aŭstrajn pacemon kaj porpacan agemon. La prezidento respondis, ke por paco en justo kaj libero oni certe ĉion risku. Sed ĉiuj registaroj devus ekagi komune kontraŭ la malamikoj de la paco, inter kiuj elstaras ankaŭ la teroristoj, kiuj ankoraŭ trovas en kelkaj landoj, toleron aŭ eĉ protekton kaj helpon.

Malaprobindas ankaŭ la ekonomia egoismo, kiel tiu de USONO, kiu entreprenas nenion por halti la faladon de sia dolaro, ne pensante pri siaj devoj rilate al aliaj kaj rilate al la komunaj mondekonomiaj problemoj.

Ĉu paco, justo kaj libero povas daŭri en cirkonstancoj ekonomie malfavoraj?

Neniukaze la justo - kaj pri la farto de paco kaj libero ni legas kaj aŭdas ja ĉiun tagon.

La rekono, ke ni aŭstroj faras nian plejeblon por paco kaj libero, ĝojigas nin. Certe, kelkaj aliaj popoloj agas same. Sed kiel oni unuecigu ĉiujn al fortostreĉo komuna, por tio ni aŭstroj ne scias recepton, bedaŭrinde!"

Aranĝoj de Germana Esperanto-Junularo (GEJ)

21-a Internacia Seminario de GEJ

107 gejunuloj el 15 landoj partoprenis la 21-an Internacian Seminarion de GEJ en Rotenburg sub la temo: Edukado - kun kiuj celoj?

Renkontiĝo por kunlaborantoj

Asocio ne nur konsistas el estraro - nenio nova? Ke ĝi kutimas havi lokajn grupojn kaj aliajn suborganizojn, verŝajne ankaŭ estas konate, bone. La estraro laboras en nacia kaj internacia niveloj, interŝanĝo de ideoj kaj spertoj do estas en la naturo de la afero.

Kontakto inter lokaj grupoj aliflanke maloftas, per tio ankaŭ la okazo demandi aŭ respondi demandojn de aktivuloj el la sama ebeno. Organizaj problemoj, motivigaj problemoj, publikiga problemoj - ĉio ne estas unika. Interkomunikado do almenaŭ povas helpi ŝpari aŭ dividi laboron. Interkomunikado progresigas, donas novan entuziasmon kaj konvinkas novajn aktivulojn..., kiujn ni neniam havos sufiĉe.

GEJ organizos, ne nur por germanoj, seminarion por kunlaborantoj de la 3-a ĝis la 7-a de februaro 1978 en Oberwesel (inter Bingen kaj Koblenz). La partopreno kostas 60,- GM.

Aliĝu ĉe Otto Gessner, Karl-Straub-Str. 1, D-8700 Würzburg.

Internacia Junulara Renkontiĝo

De la 24-a ĝis la 27-a de marto 1978 okazos la paska renkontiĝo de Nederlanda Esperanto-Junularo. Muziko, danco, sporto kaj ludo estos gravaj eroj de la renkontiĝo. La kotizoj estos 55 nederl. guldenoj, 55 GM, 782 belgaj frankoj, 100 francaj frankoj aŭ egalvaloro.

Informiĝu ĉe Nederlanda Esperanto-Junularo, Coranthijnestraat 75, NL-8003 Groningen, Nederlando.

Labori kaj ferii en Jugoslavio

Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio (Vase Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio) organizos dum aŭgusto 1978 Internacian Junularan Laborbrigadon. Oni laboras 6 horojn potage krom dimanĉe. Por ĉiuj partoprenantoj estas certigitaj loĝigo, kvar manĝoj potage, laborvestaĵoj kaj ŝuoj, kaj vojaĝkostoj en Jugoslavio. Aliĝu ĉe la supra adreso!

Esperanto en Radio

Zagrebo. Post la kutimaj novaĵoj ni aŭdis priparolon de kelkaj ricevitaj periodaĵoj, inter ili Voĉo, Kancerkliniko kaj Kontakto. La plej multaj el la priparolitaj periodaĵoj bedaŭrinde estas stencilitaj. Ĉu ili vere estas periodaĵoj, gazetoj? Ĉu niaj gazetoj ne perdas valoron?"Kontakton"oni ĉefe recenzis negative. - Sed kio okazas en Jugoslavio? Ĉu la jugoslavia movado resp. la jugoslaviajesperantistoj ne povas subteni belaspektan revuon? - La venonta elsendo traktos respondojn al niaj korespondantoj.

Svisa Kurt-onda Radio. S-ro Claude Gacond daŭrigis la serion pri la historio de Svisa Esperanto-Societo laŭ citaĵoj el Svisa Espero. - La signifon de la romanĉa infanĝardenoj kaj la lerneja instruado en Romanĉio traktis la parolado de d-ro A. Baur. El ĝi ni vere eksciis ion novan, ion ĝis nun ne konatan.- La venonta elsendo temos pri du nove elektitaj konsilistoj (ministroj).

Radio Vatikana. Post la semajna liturgia penso ni aŭdis leterkeston. El ĝi ni eksciis, ke dum 1977 Radio Vatikana ricevis pli ol 2000 korespondaĵoj. Dum la lasta monato Radio Vatikana ricevis 348 korespondaĵojn el 25 landoj. 36 korespondantoj estas novaj. Je la pinto de la korespondantoj staras Federacia Respubliko Germanujo kun speciale d-ro J. Kondor el Neuwied; la duan lokon tenas surprize Pollando!

Radio Varsovio. La sabata kaj dimanĉa programo ne estis la kutima. Anstataŭ la kutima "Semajno en Pollando" oni aŭdis priparolon de Gierekvortoj. Nur dimanĉe posttagmeze, je la 16,30 horo, oni povis aŭdi la sonrevuon "La Semajno en Pollando", kiu ĉefe estis dediĉita al la jam konata landa konferenco. Nur dufoje, dimanĉe vespere kaj lunde matene, oni povis sekvi la mallongan version de Esperanto-Ekspreso, kiu konsistis el du eroj: La novjara mesaĝo de Humphrey Tonkin laŭ Pilo-Press 1/78 kaj raporto de A. Pettyn, estrarano de UEA, pri la okazinta estrarkunsido de UEA (7./8.1.78)
La temoj de la semajno de Jan Klimek denove sin okupis pri la nacia konferenco kaj Jerzy Grum ĉi-foje parolis pri sporto, pri la futbalmatĉo Pollando - Federacia Respubliko Germanio komence de junio en Argentino. La ĵaŭda leterkesto nin informis pri la stato de korespondaĵoj en 1977 laŭ landoj. Je la pinto staras GDR kun ĉ. 900 korespondaĵoj, kiu pozicio ĉefe ŝuldiĝas al Trude kaj Paul Thomas kaj aliaj diligentuloj.La duan lokon tenas Sovetunio kaj la trian Federacia Respubliko Germanio kun ĉ. 640 korespondaĵoj. Kaj el ĉi tiu lando elstaras Ernst Höpfler, Dr. J. Kondor, Heinrich Nischwitz, Ludwig Pickel kaj F.W. Poppeck.

La politikaj temoj sin ĉefe okupis pri la 33-a datreveno de la liberigo de Varsovio. Oni konstatis - certe prave -, ke Varsovio hodiaŭ estas pli bela ol iam ajn. Okazis multaj aranĝoj, aŭdiĝis kantoj pri Varsovio. Oni aŭdis pri transdonitaj premioj de Varsovio, pri la universitato de Varsovio,kiu eklaboris kiel la unua universitato ekde 1945, kaj pri la vojvodiaj balotkunvenoj.

Radio Vieno - ORF. Iom post iom pliboniĝas la aŭskultebleco de Radio Vieno. Ni sufiĉe bone komprenis la semajnan komentarion de d-ro Alfred Macher kaj parton de la praktika propono de la viena financ-eksperto d-ro Josef Hartl pri revalorigo kaj valorstabiligo de la esperantista monunuo "Stelo". Cetere la elsendoj de Radio Vieno estas aŭdeblaj:

Sabate, je la 17,45 - 17,55 sur ondoj 48,74 m, 30,71 m, 30,85 m resp. 6155, 9770, 9725 khc.

Dimanĉe, je la 6,45 - 6,55 sur ondoj 48,74 m, 49,88 cm, 16,82 cm resp. 6155, 6015, 17840 khc.

La semajnan komentarion ni publikigos en alia loko.

Radio Romo. Tiu stacio estas bedaŭrinde ĉiam ankoraŭ malbone, kelkfoje entute ne komprenebla. Ĝi ja estas en la aero, oni aŭdas la Esperantan voĉon, sed oni nur malbone komprenas.

***************************

Aŭskultu kaj skribu al la Esperanto-stacioj!